

# NORDFRANCA

# ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn de la Norda Federacio  
kaj de la Grupoj

REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements  
de la Fédération du Nord et des Groupes



Redaktejo kaj administrejo:  
18, rue Albert I<sup>er</sup> - DUNKERQUE (Nord)  
C. VERNAY, Direktoro-Prifrespondanto  
G. VANHOVE, Administranto

*Redakta Komitato, redaktas*

Jarabono: Francujo 10 frankoj  
aliaj landoj: 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro  
POŝTCHEKONTO: LILLE 403-50  
C. VERNAY, DUNKERQUE

Les bonnes adresses de Dunkerque...

**KODAKS**  
PHOTO-AMATEURS

**CAYEZ**

9<sup>bis</sup>, Rue Clémenceau - DUNKERQUE

Travaux - Agrandissements  
Stocks de toutes marques  
*Esperanto parolata*

ATELIER DE RELIURE ET CARTONNAGE  
(Fondé en 1860)

**Louis BLOT**

10, Rue Dupouy, DUNKERQUE

Reliure en tous genres  
de luxe et d'amateur  
*Esperanto parolata*

IMPRIMÉS EN TOUS GENRES - PAPETERIE  
RELIURE - GRAVURE  
Fournitures classiques et de bureau

**Librairie du Beffroi**

Albums et Timbres pour Collectionneurs  
Livres - Insignes Espérantistes

**MOREAU-FOURMEUX**

28, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

"Au Roi du Saucisson"

**Roger BRATS**

30, Rue Michelet  
COUDEKERQUE-BRANCHE

Fromages, Conserves, Confitures  
*Vente sur tous les Marchés de la Région*

Fabrique de Casquettes  
BÉRETS - CHAPEAUX

**EDMOND**

Chapelier

38, Rue Poincaré - DUNKERQUE

"Les BLEUETS"

26, Rue Poincaré - DUNKERQUE

**Blanche RAMOUT**

Fleuriste

Vous y fournir, c'est affirmer votre bon goût  
Choix de Plantes - Cerbeilles  
Gerbes et Bouquets

**Les Coopérateurs**  
de Flandre et d'Artois

3, route de Bergues - Coudekerque-Branche

La Coopération est le moyen idéal de  
répartition des produits de consommation  
*Adhères tous à la Coopération pour défendre  
vos intérêts*

Depuis sa fondation, notre Société a payé  
à ses adhérents plus de 40 millions francs  
de ristournes et d'allocations (naissances,  
maladies, décès).

*La Coopération est un Syndicat  
de Consommateurs*

LES COOPÉRATEURS vendent à tous :  
actionnaires ou non

*Nos magasins sont ravitaillés chaque matin  
en PAIN d'excellente qualité (vendu 0 fr. 10  
au-dessous de la taxe officielle).  
en LAIT FRAIS PASTEURISÉ.*

**Tout l'HABILLEMENT**

Hommes, Jeunes Gens  
Enfants

**AU BON VÊTEMENT**

Maison O. ROZEN  
17, Rue des Chaudronniers  
DUNKERQUE  
*Esperanto parolata*

**BIJOUTERIE**

**Georges MAEGHT**

9, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

Choix énorme de Bagues de fiançailles  
Alliances et Cadeaux de mariages  
Rabato al niaj Samideanoj

# NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

2a Serio 15a Jaro N° 11-12 SEPTEMBRO-OKTOBRO 1938

EK AL LABORO ! NI PREPARU VIGLE LA VINTRAJN KURSOJN !

Adhérons tous dès à présent au Congrès Fédéral  
qui aura lieu à Fresnes-sur-Escaut  
le 14 Mai 1939



La esperanto-tabulo en la stacidomo de Dunkerque. Samaj esperanto-tabuloj, kun la verda stelo kaj la adreso de la loka I.E.L.-delegito (S-ro Le Moine), estas ankaŭ fiksataj ĉe la dometo de la "Essi" (Asocio por turismo) kaj en la marstacidomo (fervoja pramo "ferry-boats"). La bildo montras, maldekstre : S-ron Le Moine ; meze, S-ron Pragano, el Rumanujo kaj dekstre nian amikon Houzé, inĝeniero de la haveno kaj sekretario de la Esperanto-Grupo.

## NI DAŬRIGU !...

### Modela veturigisto

Oni tro malice parolas pri la veturigistoj, por ne diri iom da bono pri ili, kiam la okazo sin prezentas. Nu, jen tio, kiom mi vidis, kaj kion mi plezure rakontas.

Estis nokto, ĉirkaŭ la deka, sur avenuo trankvila, kie ni paceme promenis. Alvenas fiakro, trote; la hufoj de la ĉevalo resonas sur la alfasto en la silento de la senviva avenuo. Subite la bruo ĉesas; mi rigardas, kaj mi vidas la ĉevalon, kiu malantaŭenpaŝas, pli kaj pli, kaj mi aŭdas la veturigiston, kiu per milda voĉo, diras al ĝi: « Nu, Koko, estas nenio ne timu... »

Sed Koko timas, ĝi volas nenion aŭdi; ĝi ĉiam malantaŭenpaŝas kaj la veturilo, inverse puŝita, jam havas radon sur la trotuaro. Scivoleme, mi alproksimiĝas. Iu ajn same agus sed precipe min logis la nekutima malkolero de la fiakristo, kiu, ne kolerigante, diras plue: « Nu, Koko, estas nenio, ne timu, ne timu !... »

Kiom, en sama okazo, prenas la vipon per la maldika ekstremaĵo, kaj frapas per la bastono siajn kompatindajn bestojn, fortege spite de la leĝo Grammont.

Sed pro kio Koko timis ?

Unu el tiuj pezaj veturiloj, kun dika rulo el ŝtono, kiuj utilas por premege la ŝtonojn kaj niveli la soseojn, estis lasita laŭlonge de la trotuaro, la brakoj supren. Ĝia nekutima formo timigis la beston, cetere iom suspektema. Ĝi starigis siajn orelojn, ĝiaj gentoj tremis.

La fiakristo elveturigis, ne maltenante la kondukrimenojn, kaj ne ĉesante paroli al la besto, kiel li estus farinta por saĝa estaĵo: « Nu, Koko, vi timas por nenio ». Kaj ĝin karesante per unu mano, kaj per la alia prenante la bridon: « Mi estas vin kondukanta tien, vi vidas, kio ĝi estas, Iru ni ambaŭ... »

Dume, Koko estis alveninta, kvankam ne sen peno, apud, la rulo, kaj ĝi spiregis, spiregis, kaj jetis la kapon dekstren, maldekstren, por ne vidi. Sed la veturigisto uzis ĉiom, klom da pacienco necesis. La besto, iom rekuraĝigita, li igis ĝin antaŭeniri, paŝo post paŝo, laŭlonge de la veturilo, tenante ĝian kapon tuj apude. Mi estis en admiro...

Fine, kaj tio ankoraŭ pli mirigis min, kiam Koko estis preterpasinta la maŝinon, ĉar ĝi montris la deziron foriri plej rapide: « Ne, ne, diris tiu modela kaleŝisto, ni iru ankoraŭfoje; necesas ke vi kutimiĝas al tio ».

Kaj li reirigis ĝin al la timigilo, kaj tie li tenis ĝin dum kelkaj minutoj, ĉiam parolante al ĝi, kaj manbatetante la kolon.

Kaj kiam Koko estis vidinta bone la objekton, de antaŭe, de flanko, de malantaŭe; kiam ĝiaj oreloj estis kvietaj; kiam ĝiajn genuoj ĉesis tremi; kiam sub la okulŝirmiloj oni vidis ĝiajn okulojn tute rekuraĝigitaj; tiam karese, ĉiam delikate, tiu majstro veturigisto, vere inda je kondukado de homoj, resupreniris al sia sidloko:

« Nun, Koko, vi povas iri, sed ne tro rapide, ni ŝajnus forkuri! Kaj Koko trote ekkuris, kiel ĝi estis veninta... »

ADE.

## La Esperanta vivo en Desvres

Jam antaŭ la mondmilito, kelkaj sindonemaj esperantistoj el Bulonjo, eble S-ro Michaux kaj S-ro Haigneré, klopodis por propagandi Esperanton en Desvres. Prelego kaj kurso okazis. Sed dum la postmilitaj jaroj, Esperanto estis tute forgesita.

En 1936, S-ro Stuit, kiu tiam gvidis kurson en Bulonjo, havis la ideon pliampleksigi sian agadon en la ĉirkaŭaĵo, kaj tiel, unu belan tagon, li venis ĝis Desvres. Li vizitis la urbestron, kiu antaŭlonge iom lernis esperanton kaj tuj donis sian aprobon por la kurso. Li ankaŭ vizitis la direktoron de la knaba lernejo, S-ro Dumarquez, kiu promesis paroli al siaj lernantoj pri la lingvo kaj la kurso. La provlecionon ĉeestis pli ol 50 personoj kaj ĉirkaŭ 25 regule vizitadis la kurson. Ĉiumarde kaj ĉiuvendrede, en la malnova kaj malgaja ĉambro de la urba tribunalo, kunvenis la lernantoj, el kiuj estis tri instruistoj kaj kelkaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj. Ege interesa estis la kurso. S-ro Stuit, bonege, malrapide parolas, kaj montras multajn objektojn, kiujn li elprenas el sia mirinda pape-rujo: la ruĝa kato, la bela rozo, la inteligenta elefanto, la diverskoloraj skatoloj... Ofte li praktikas la hispanan etiketon kaj donacas al ni kraĵojn, esperantajn kalendarojn, ĉokoladojn, kiuj feliĉigas nin. Kaj ni ĉiuj rediras la esperantajn vortojn, kaj entuziasme ni lernas la belan lingvon de la amo, de la homaramo. S-ro Stuit estas entuziasma, kaj igas nin entuziasmaj. Kun eterna rideto li parolas kaj rakontas...

Je la fino de la kurso oni starigis grupon kies nomo estis "Fraterco per esperanto". La prezidanto estas S-ro Dumarquez kaj la sekretario S-ro Paquentin.

De tiu momento la grupo vivas seninterrompe. Ĝi havas kason kaj bibliotekon. Diversaj prelegoj okazis, S-ro Thien bonhumore habilis pri la sekigado de la Suda Maro. S-ro Stuit revenis kaj paroladis pri la esperanta literaturo. S-ro Dumarquez prelegis en la urbdomo pri la universalaj lingvoj kaj Esperanto.

Nuntempe Esperanto vivas precipe en nia centra knaba lernejo. En la komplementa kurso, kiu konsistas el du klasoj okazas du kursoj. Por komencantoj en la unua klaso, por daŭrigantoj en la dua klaso. Entute ni estas 50 lernantoj, kiuj lernas la lingvon internacian, devige, kaj tamen bonvole, tiel ke 21 el ili sukcesis en la Atesto pri lernado.

Antaŭ du monatoj okazis prelego de S-ro Pragano pri sia lando: Rumanujo kun belegaj lumbildoj. Li parolis tre simple kaj klare, kaj ni tre bone komprenis sian paroladon pri la pejzaĝoj, la kutimoj, la moroj kaj la legendoj de tiu bela lando.

Nun ni estas certaj, ke Esperanto ne estas utopio, sed estas la plej bona ilo por la interkompreniĝo de la homoj. Ni deziras, ke en la tuta mondo, la geknaboj imitu nin, kaj lernu tiun belan lingvon, lingvon de la paco kaj de la frateco.

*La Esperantistaj Lernantoj en Desvres.*

## Senhareco

Amikoj miaj min kompatis  
Dirante ke mi perdas harojn,  
Kaj efektive mi konstatis  
Ke, ke mi perdas miajn harojn.  
Car ĉiutage ekzemplero  
De mia malfidela trupo  
Forlasas min kaj... per kulero  
Mi kaptas ĝin... en mia supo!

Min tre ĉagrenis tiuj mokoj  
Kaj mi aĉetis kuracilon  
Laŭdatan en gazetalvokoj  
Por tuj ekstermi la bacilon!  
Kaj la vendisto min konvinkis  
Dek litroj... estos ja necese!  
Mi ilin prenis kaj... eĉ trinkis,  
Sed bedaŭrinde sensukcese.

Kaj laŭ ordono de l'doktoro  
Mi diris aŭtosugestie:  
« Mi havas harojn je l'honoro! »  
Kaj mi ĝin diris ĉiam, ĉie.  
Ĝin aŭdis foje strata bubo,  
Kaj tuj dekretis kiel papo:  
« Vi havas harojn, jes sendubo,  
« Sed certe ne sur via kapo! »

Kaj miaj bonaj ĝeamikoj  
Pretendis kun mordanta sprito,  
Ke al fabriko de penikoj  
Mi ilin vendis (kun profito),  
Kaj ili ĝuis tre sincere;  
Nun estas fakto, ho karulo,  
Ke via kapo vere, vere  
Aspektas kiel bilardbulo!

Mi poste al doktoro iris  
Konata fame trans la maroj,  
Kaj sendemande tuj li diris:  
Sinjor', vi venas por la haroj!

Sed mi kuracos vin rapide  
Per novsistema energio;  
Rekreskos haroj tre solide,  
Dank'al la aŭtosugestio!

Mi ne plu kredis la promeson  
De la scienca medicino  
Kaj tial serĉis la adreson  
De pli fidinda sorkistino.  
Mi trovis ŝin kaj ĉe l'akcepto  
Si diris: « Havu multajn dankojn!  
Por harkreskigo jen recepto,  
Ĝi kostas ducent kvindek frankojn!

Mistere kun ceremonio  
Si flustris min per raŭka tono:  
La tagon post Epifanio  
Vi prenos grenojn de melono,  
Vi prenos denton de simio  
Kaj voston de graveda rano  
Kaj pistos ĉion per kranio  
De trimonata suĉinfano.

Al tio ĉi vi akurate  
Almikso sangon de ŝtatestro  
Kaj kruccsignante vi sabate  
Trifoe kraĉos tra l'fenestro.  
Vi poste ŝmiros per fluido  
Laŭlonge ĉiam de l'vertebro.  
Mi eĉ ne diris « ĝis revido »  
Sed mi forkuris kiel zebro!

Mi turnis min kun nova kredo  
Al komercisto belpromesa.  
Laŭ li nur lia harrimedo  
Montriĝis taŭga kaj sukcesa  
Li kun rideto tre honesta  
Mezuris kapon kaj la nukon  
Kaj kontraŭ sumo tre modesta  
Li vendis nun al mi... Perukon!!!

Raymond SCHWARTZ.

(kun la speciala permeso de l'aŭtoro.)

## MALNOVAJ NOVAĴOJ

**FEDERACIO DE L'NORDAJ GRUPOJ.** — Ĝi denun posedas monatan bultenon, "Norda Gazeto", tute presitan sur verda papero kaj enhavatan bonegajn lokajn sciigon. (Red. S-ro Deligny, Bd Vauban, Saint-Omer).

**EN LA ARMEO.** — En Douai, la 20 de novembro, Kolonelo de 27a artileria regimento konigis per oficiala decido al la tuta soldataro la ekziston de kursoj en la "Unuagrada Supera Lernejo".

(La Revuo, januaro 1908).

**BOULOGNE-SUR-MER.** — Bulgara ŝipmaŝinisto, S-ro Minkov (14, quai du Bassin) per entuziasma letero sciigas, ke, dank'al la klopodoj de S-roj Perrin, el Calais, Sam. Meyer, el la Rochelle, kaj precipe de S-ro Duchochois, konsulo en Boulogne, li tie estas kontentige dungita laŭ profesio. Uzinda argumento por pravi taŭgecon de konsuloj kaj de nia kara lingvo, kiun oni iom forlasas en tiu fama urbo.

(La Revuo, februaro 1908).

**TRA LA ANGLA-FRANCA MARKOLO.** — La jaŭdon 28 de Majo. (Festotago de Cieliro) okazos de kvara esperantista ekskurso al Folkestone, organizita de la Calais'a Klubo. Aliurbaj kaj alilandaj gesamideanoj kuniĝu al niaj Calais'aj amikoj por viziti la belecan havenon Folkestone, kie espereble multaj anglaj Esperantistoj ilin akceptos. Kosto de la bileto (iro kaj returneniro): 7 frankojn kaj 35 centimojn. Por ĉiuj informoj, oni sin turnu al S-ro Albert Herreman, sekretario (111, boulevard Lafayette, Calais, Franc.).

(La Revuo, majo 1908).

**AMIENS.** — Generalo Joffre, komandanta la 2-an francan armeokorpuson fariĝas komitatano de la tiea grupo.

(La Revuo, marto 1909).

### NOVAJ GAZETOJ.

**L'Informilo**, trimonata bulteno por la propagando de Esperanto, uzata de la esperantistaj francaj grupoj. Redakcio kaj administracio: 8, rue de Rome, Calais (Francujo); 25 ekz. = fr. 0,80; 50 = fr. 1,50; 100 = fr. 2,50.

S-ro Perrin havis tre bonan ideon: liveri al la francaj propagandaj societoj tre malkaran folieton, kiu vere utilis al la propagandado. Ĉiu-trimonate ĝi resumas koncize la rezultatojn akiritajn kaj la progresadon de nia bela lingvo.

**Norda Gazeto**, monata bulteno de la esperantistaj grupoj de la Nordo de Francujo. Redakcio kaj administracio: S-ro E. Deligny, boulevard Vauban, Saint-Omer (Nord); jare Fr. 1.

Norda Gazeto estas la vigla ligilo de l'norda federacio, lertege redaktata de nia amiko Deligny.

(La Revuo, majo 1909).

**DIVERSLANDAJ NOTINDAĴOJ.** — Nova grupo fondiĝis en la industria urbeto Hénin-Liétard (Pas-de-Calais).

(La Revuo, Aŭgusto 1909).

**DOUAI.** — La du lokaj deputatoj, S-roj Goniaux kaj Guislain, konigis sian favorecon al Esperanto, kaj promesis *letere* apogi la estontan legproponon de sia kolego S-ro Justin Godard por laŭvola instruado de Esperanto en la ŝtataj lernejoj. La tiea grupo, kiu organizis poresperantan fakon en la loka "Industria Ekspozicio" ĵus ricevis de ĝia estraro orumargentan medalon.

(La Revuo, oktobro 1910).

## 4<sup>a</sup> Internacia Semajno en Malo-les-Bains



Grandulo, dum somero, en Malo-les-Bains !  
(Kliso de "Verda Nazo").

La vetero ne estis tre bela en Malo dum la 4<sup>a</sup> Internacia Semajno. Ventis, pluis kaj kelkfoje ankaŭ la suno bonvolis sin montri. Sed tamen (kiel dirus R. Schwartz !) la kurso de S-ro Persson havis grandan sukceson. La profesoro estas tre taŭga kaj konas sian aferon. Tamen la grandan sukceson de la semajno ni ŝuldas vere al la "apola" junulo, kiun oni alnomas *Grandulon*, (al Cezaro ni redonu tion, kion al li apartenas !) Efektive, pro grava difekto de lia bela pantalonon, dum sep tagoj kaj sep duonoktoj ni vidis vagi la *Grandulon*, kvazaŭ moderna Petrono, promenanta kun lia pluvombrelo sur nia mardigo, vestita kiel montrite sur la ĉi supra bildo !

Tre bona raporto pri tiu ĉi 4<sup>a</sup> Internacia Semajno aperis en "Belga Esperantisto" de aŭgusto-septembro. S-ro Van der Stempel, nia belga samideano, kiu partoprenis tiun semajnon ĝin verkis. Ni publikigas tiun raporton por niaj legantoj.

« La libertempsemajno en Malo (2<sup>a</sup> ĝis 10<sup>a</sup> de Julio komenciĝis per grava festvespero en la bela stel- kaj flagornamita salonego de la urbdomo, kie ĉeestis kelkcentoj da homoj, ankaŭ neesperantistoj. Kunlaboris aro da admirindaj artistoj kun tre varia kaj alloga programo. Sekvis granda balo ĝis la 2<sup>a</sup> horo. Jen granda sukceso, ĉar la publiko ege amuziĝis kaj ne sparis aplaŭdojn !

Dimanĉo, la 3<sup>a</sup> estis memorinda tago por Esperanto, ĉar oni inaŭguris Zamenhofstraton en la antaŭurbejo Rosendaël. Trairinte la urbeton, muzikon antaŭe, sub al mirigitaj okuloj de la enloĝantoj, la samideanoj haltis ĉe la loko de inaŭguro. Oni ludis « La Espero » kaj forprenis la francan flagon kovrintan la strat-tabulon, kiu nun aperigis, en verdaj literoj sur blanko fono, la vortojn :

Rue Zamenhof

(Créateur de l'Esperanto)

Simplaj vortoj, sed kiom signifaj !

S-ro Degand, prezidanto de la Dunkerka grupo, en emociplena parolado, rememorigis la vivon kaj penadon de D-ro Zamenhof kaj montris la gravon de Esperanto por la frateco inter la popoloj.

Poste la sekvantaro remarŝis tra al stratoj ĝis la urbdomo kiu estas nova, alvalora konstruaĵo. S-ro Degand dankis la urbestaron pro ĝia kunhelpo kaj la sveda verkisto S-ro Engholm, en nomo de la Svedoj kaj de la tuta Esperantistaro gratulis la urbestron kaj la loĝantaron.

Tiam S-ro Degand alparolis S-ron Engholm, alludante lian grandan verkistan talenton. Post tio, ĉiuj paroladoj estis laŭnecese tradukitaj Esperanten aŭ Francan.

La ĉintaga kunvivo en Malo-les-Bains estis vera regalo por la Esperantistoj. — Matene de la 10<sup>a</sup> ĝis la 12<sup>a</sup> okazis perfektiga kurso, tiunĉi jaron sub gvidado de al kvalifika Cseh-intruisto S-ro Persson. Lia pacienca, malrapida kaj klarega komprenigo malaperigas ĉe la instruatoj la lastajn dubojn pri la ajn gramatika punkto. La lernado iĝas plezuro kaj oni pliriĉigas siajn konojn senlaciĝe kaj senpene. Posttagmeze, oni faris diversajn intereseajn ekskursojn : vizito de la grava haveno de Dunkerque sub la gvido de la inĝeniero S-ro Houzé, sekretario de la Esperantista grupo ; alitage, oni veturis al Bergues kie la samideanoj atenté vizitis la tre interesan muzeon kaj estis akceptataj kaj regalataj en la urbdomo. Se ne estis ekskurso, oni promonis, banis, ludis aŭ ripozis

sur la bela plaĝo. — Vespere, oni kune kantis, ludis pianon aŭ aranĝis feston, kun ĉeesto de la Dunkerkaj grupanoj. Tiam iuj kantis, aliaj rakontis humorajojn aŭ faris paroladojn. Tiel parolis: S-ro Engholm (Svedujo) pri Esperanto kaj ĝia propagando, S-ro Rousseau (Parizo) pri siaj spertoj dum oficialaj kongresoj de Esperanto, S-ro Ockey (Anglujo) pri la Esperantista vivo en Londono. Oni multe admiris la talenton de Fraŭlino Tondelier (Lille) kiu tiel sprite deklamis humorajn kantetojn ke ŝi ridigis la plej severan gravulon.

La 8-an de Julio okazis akcepto de la partoprenantoj en la belaga urbdomo de Dunkerque, kie la tiea grupo esperantista regule kunvenas. Post vizito de la konstruaĵo, S-ro Degand franclingve prezentis la Esperantistajn gastojn, speciale memorigante la valoron de la verkaro de S-ro Engholm. S-ro Houzé tradukis Esperanten.

Tiam parolis S-ro Ockey el Londono en nomo de la eksterlandanoj kaj tradukis francen S-ro Van der Stempel (Bruselo). Post tio la urbestro ĉarme respondis kaj ĉiuj gustumis la honorvinon.

Bela finfesto estis aranĝata je la lasta vespero, Sabaton, la 9-an, kiam la amikaro prezentis belajn donacojn al S-ro Houzé kaj S-ro Persson, pro ilia rimarkinda sindono, kaj ankaŭ florojn al la Hotelestrino kaj ŝia filino pro ilia bona zorgado.

Dimanĉon, la 10-an, la loĝintoj, inter kiuj troviĝis anoj de 5 diversaj nacioj (Francoj, Svedoj, Angloj, Nederlandanoj, Belgoj) disvojaĝis kun multa bedaŭro, sed ankaŭ kun granda dankemo pro la ĝuita plezuro.

Gastama kaj kora atmosfero! Certe estas ke Dunkerque, Malo kaj Rosendaël estas ne nur alloga kaj ĉarma, sed ankaŭ verda regiono, ĉar la aŭtoritatuloj same kiel la loĝantaro estas tute simpatiaj rilate al Esperanto.

Estas fakte regiono kium ĉiu vera esperantisto el nia lando devas viziti. »

## INAUGŪRO DE LA STRATO ZAMENHOF EN ROSENDAEL

La inaŭguro de la strato Zamenhof en Rosendaël fariĝis bela festo, festo de internacia amikeco, kiu bone montris ke nia lingvo estas ne nur kapabla vekti intereson ĉe la publiko sed ankaŭ ke ni ne laboras vane por la interkompreniĝo de la popoloj.

La regiona gazetaro raportis favore pri tiu okazintaĵo. Jen estas la raporto, kiu aperis en "Le Petit Calaisien" de la 7-7-38 :

« Dimanche a eu lieu à Rosendaël l'inauguration de la rue Zamenhof, percée dans la dune, jusqu'à la limite de Leffrinckoucke.

« 200 Espérantistes français et étrangers assistaient à cette touchante cérémonie.

« Dès que fut tombé le drapeau tricolore qui voilait la plaque, M<sup>r</sup> Degand, président de la Fédération Espérantiste des Groupes du Nord de la France, remercie chaleureusement MM. les Maires et les édiles présents à la cérémonie et, en termes émouvants, retraça la vie, toute de sacrifices, du Docteur, qu'il qualifia très justement, de bienfaiteur de l'humanité.

« " Des cérémonies comme celle-ci, dit-il, se déroulent chaque semaine dans le monde entier. Partout le nom du D<sup>r</sup> Zamenhof s'élève par dessus les remous violents qui secouent les nations et il en sera ainsi jusqu'au jour où tous les hommes, quelle que soit leur origine, se comprendront et se tendront fraternellement la main, comme ceux que j'ai le plaisir de voir aujourd'hui dans le cercle restreint qui nous entoure. »

« Les Espérantistes se rendirent ensuite à la coquette mairie de Rosendaël où leur était offert un vin d'honneur.

« M. le Maire leur dit tout le plaisir qu'il avait à les accueillir et principalement en cette circonstance, les étrangers, qui étaient la vivante démonstration de la belle langue mondiale qu'il se promettait bien de continuer à encourager.

« Ce discours ainsi qu'une brève allocution, toujours humoristique du citoyen Valentin, maire de Dunkerque, furent traduits par M. Houzé.

« Au nom des étrangers, M. Stellan Engholm y répondit en termes émouvants et flatteurs à l'adresse des Français si accueillants et l'on se réunit ensuite pour le banquet à l'hôtel "Eole" sur la digue de Malo, où, bien entendu, l'Espéranto "estait parolata". »

## LA MOVADO

*Dum ekstere reĝas la vespera lumo,  
Jen, interne eĝas la espera "umo";  
Dum samideanoj premas ronda devo,  
Al amideano remas blonda, Evo.*

sed ne pri tio temas. Temas pri la movado. Por objektive juĝi estas necese fari viziton ĉe iu oficiale kunsido. Egale en kiu lando aŭ ĉe kiu societo, ĉar ĝi aspektas egala en la tuta mondo. La movado estas kiel la akvo mara: *tre amara kaj ĝi ondas... ondas*. En ĉiu ero ĝi estas neĝueble salgusta.

Mi staras antaŭ la pordo de B.E.S. (Bagonia Esperantista Societo). Antaŭ ol paŝi en la lokan sanktejon de la tutmonda kulturmovado mi subaŭskultas la misteran *silenton*. Kiel ĉu Jam estas la fiksita horo de la komitatkunsido. Ĉu mi estus la unua? Eraro. La pordisto informas min pri ĉeesto de juna gesamideana paro, alveninta antaŭ duonhoro. Verŝajne ili praktikas interne la "internan ideon". Do ne malutilas ŝajniĝi gorgkataron. Bonvole mi tusetadas ĉe la sojlo.

Kaŝtanhara junulo kaj blonda ĉarmulino modestadas en la ĉamburon. Li sidas ĉe la tablo kaj tenas en la mano gazeton — renversita; ŝi staras fore de li kaj atente ĝuas la artajn konturojn de la Verda Stelo, pendigita sur la muron. Ili silentas. Nur la frizuroj, ardantaj vangoj kaj unu kravato, elokventas. Li salte leviĝas kaj tro laŭte salutas min. Ŝi nur perkape esprimas sian — bondeziron. Mia koro ridetas. Estas ja Majo. Sed mia buĝo ne perfidas; ĝi pritraktas la problemon de la "kvanto kaj kvalito". Ili embarasite silentas. Eĉ unu Esperanta vorto, ne forlasas iliajn lipojn. Mi penas liberigi ilin de embaraso kaj pli-proksimigi ilin unu al alia. Tiel disigite ili aspektas gemalamikoj. Kaj mi sentas mian kulpon. Komprenoble mi sukcesas, ĉar tiun sukceson ili mem pleje deziras. Intertempe sugeste rigardante al la junulo mi arange tuŝas du-trifoje mian kravaton. Fine li komprenas kaj forigas la postsignon de la "kunsido" rearanĝante diskrete sian kravaton. Vira solidareco petolas danke el lia rigardo al mi...

... kaj ni triope sidas sur la kanapo... kaj ni atendas... atendas. Fine kvaronhoron post la fiksita tempo alvenas tri gravmienaĵ sinjoroj: du komitatanoj kaj la kasisto. Babilado en "nia kara lingvo", sed nur modere kaj laŭeble kun multaj gramatikaj eraroj, poste... poste atendo, atendo.

Nu, fine alvenis ankaŭ la sinjoro sekretario kun fremdlanda gasto. Pro la malfruo li estus preta senkulpigi sin, sed vidante la mankon de la prezidanto li amindume komplimentadas al la ĉarmulino. Pasas minutoj, sed fine venas li : la prezidanto.

La "Bonan vesperon" fore-kore sonas. La sinjoro embarasite ridetas kaj respondas — nacilingve. Nemirinde ! La movado ne estas esperanta gramatiko, kiu ne toleras esceptojn. Tio estas jam preskaŭ tradicia kaj ni estas tradicirespektanta popolo. Kaj kial ne ? Mi konis ja tian reĝon, kiu ne parolis la lingvon de siaj regatoj, tamen li asertis plenan komprenon. Guste tiaj estas la *ne esceptaj prezidantoj* en nia movado. La esceptaj : kiuj parolas Esperanton, ĉiam plendas, ke ili "ne povas kompreni la esperantistojn, nek tiuj ilin". Cetere *nia* lingvo bezonas ne parolantojn, sed nur famnomajn protektantojn, kiujn ni povas respekti, estimi, honori kaj kiuj bone komprenas nin guste pro tio, ĉar ili restas ekster la limo de la lingva kompreno.

Nu, la sinjoro prezidanto eksidas, elpoŝigas sian horloĝon, metas ĝin sur la tablon kaj definitive ekzitante Esperanton li malfermas la nacilingvan kunsidon de B.E.S. Ĉe la tablo rolas : la Prezidanto, Sekretario, Kasisto, 1a kaj 2a Komitatoj. Honorloke, sed iom fore de la tablo, la fremdlanda mondvojaĝanto silente digestas. Li ŝajnigas grandan atenton al la nekomprenebla lingvo. La popolo, premante sin unu al la alia, modestadas sur la angula kanapo : la du ĝeamideanoj kaj mi.

Nun sekvas protokola ekstrakto, eble iom kurba ; sed pli fidele respiculanta la realecon ol la oficiala protokolo mem.

*Prezidanto* (per dekminuta enkonduko klopodas konvinki la ĉeestantojn, ke Esperanto estas necesa kulturfaktoroj) : ... kaj tamen... ĉar... kvankam... vidu, esinjoroj, sekve... jes... ne... la nekredemo skeptike neas... Oni aŭdante la vivan parolon, tamen ne kredas pri la ekzisto de la lingvo, simile al la kamparano, kiu kun sia amiko vizitis la zooloĝian ĝardenon kaj vidante la ĝirafon li ekkriis : "Tjiii ! Baptono, tia besto eble eĉ ne ekzistas !"

*Komitatoj* (entuziasme aplaŭdas) : Prave ! Prave !

*Fremdlandano* (konvinkite de la nekomprenebla parolo) : Vivu ! Esperanto progresas. (Li ĝentile aplaŭdas).

*Prezidanto* (indulge ridetas kaj perkape dankas la aprobon) : ĉar... kvankam... tamen... sekve... jes... ne... mi proponas la eldonon de propaganda libreto, nu, kiel mi esprimu, jes, mi pensas pri eta libro, kajereto, oportune klariganta ĉion pri la lingvo al la publiko... en cent mil ekzempleroj... kvankam... tamen... sekve la titolo estus Katekismo de Esperanto.

*Komitatoj* (forte aplaŭdas) : Grave ! Grave !

*Kasisto* (gravmiene) : Si-si-sssinjoroj, la ka-ka-kkaso estas ma-mal-pl-pl-plena. La la la propaganda pr-pr-rrovizo estas re-rerrezervita po-popor aaaalia celo. Nur ĉ-ĉ-ĉe la fi-fino de la ja-a-ro ni po-po-povos tu-u-ŝi ĝ-ĝ-ĝin. Nun e-e-estas nur Ma-Ma-Majo. (Kaj ĉion en nacia lingvo ! Prezentu al vi, kiel flue li balbutas en Esperanto !)

*Fremdlandano* (ĝentile sin turnas al la apude sidanto kaj gratulas) : Vere, tre interesan muzikon de l'parolo havas via lingvo.

*Sekretario* (raportas)... kaj fine mi ĝoje sciigas, ke la nombro de nia membraro konstante kreskas. Dum la lasta kvaronjaro aliĝis kvar novaj membroj el la dek kursoj, aranĝitaj de nia landa societo. Entute ni havas 57 membrojn, el kiuj 7 eĉ pagis la kotizon.

*Komitatoj* (forte aplaŭdas) : Brave ! Brave !

*Sekretario* : Mi havas la honoron proponi la elektadon de honoraj kaj protektantaj vicprezidantoj kaj membroj el la vicoj de niaj naciaj eminentuloj...

*Komitatoj* (aplaŭdas) : Brave ! Brave !

*Sekretario* : Mia listo entenas nur 25 gravajn kaj famajn nomojn. Ni povus kompletigi ĝin laŭ via deziro.

(Sekvas dekminuta kompletigado. Dume la Fremdlandano dolĉe ekdormas. Fine pretiĝas la listo kun 49 membroj).

*Prezidanto* : Sed, Sinjoroj, kial ŝpari je la honoro ? Mi proponas, ke la nombro de la honora vic-prezidantoj kaj membroj estu 50.

*Komitatoj* (aplaŭdas) : Prave ! Prave !

*Fremdlandano* (Aprobe ronkas).

*Prezidanto* (Senpacience rigardas sian horloĝon) : Gesinjoroj, pardonu, sed mi devus... devus... mi petas vin, kiel eble plej koncize...

1a *Komitato* (leviĝa kaj mildatone ekparolas) : Altestimata sinjoro Prezidanto, estimata Komitatkunsido, karaj ĝeamideanoj, kiel nia kara, ĉiam alte honorata sinjoro Prezidanto bonvolis trafte rimarki kaj kiel ankaŭ vi, tre estimataj komitatoj, scias, ni devas propagandi kaj propagandi, ĉar kiel nia eminenta, de ni ĉiuj tre alte estimata sinjoro Prezidanto diris kaj kiel ankaŭ vi, karaj kaj estimataj ĝeamideanoj, bone scias, ni havas kaj ankaŭ nia lingvo havas malamikojn kaj konkurantojn. Jes ! Jes ! Jes ! Ni havas malamikojn. Mi diras al vi, altestimata sinjoro Prezidanto kaj al vi, tre estimataj komitatoj, ni havas ankaŭ konkurantojn. Multajn el niaj malamikoj ni jam venkis. Jes, ni venkis jam multajn el niaj malamikoj, sed ne ĉiuj. Ne ! Ne ! Ne ! Nun naskiĝis nova. Jes, nova nun naskiĝis. Kaj tiu nova konkuranto kaj tiu konkuranto nova estas "Basic English".

2a *Komitato* (entuziasme) : Vivu Zamenhof !

*Prezidanto* : ... jes... tamen... kvankam... sekve... mi volas nur tion, kvankam mi ne scipovas paroli pli bone *Basic English-on* ol Esperanton, aŭ pli guste esprimite, mi parolas ilin samgrade, tamen... ĉar... sekve... miaopinie *Basic English* ne povas esti serioza konkuranto, ĉar ĝi celas nur tian primitivan nivelon en la konversacio, kia ekzistis inter *Robinson Krusoe* kaj *Vendredo*.

*Ĉiuj* (ekstaras kaj aplaŭde aprobas la trafan komparon) : Rave ! Rave !

*Fremdlandano* (vekigiĝas, ĉirkaŭrigardas, ekstaras kaj maŝine aplaŭdas eĉ tiam, kiam la aliaj jam estas eksidintaj. La sekretario pergeste residigas lin).

2a *Komitato* (leviĝas, Napoleon-miene ĉirkaŭrigardas kaj patose gestadas dum batalona parolado dekminuta).

1a *Komitato* (ĉe ĉiu frazo aprobas) : Prave ! Brave ! Grave ! Rave ! ktp

*Prezidanto* (subite enpoŝigas sian horloĝon kaj rifugante adiaŭdas) : Senkulpigu min, sinjoroj, mia urĝa laboro kaj granda okupateco. (Li forkuras al la Kartluda Klubo, kie li havas malbonŝanco pro la zigzage embarasaj literoj UEA, UFE, IKUE, SAT, BES).

*Sekretario* (post kvaronhoro solene fermas la kunsidon dankante al la ĉeestantoj la laboremon. La 1a Komitato afable vekas la dormantan Fremdlandanon).

(Jam ĉiuj estas en la antaŭĉambro escepte la junajn ĝeamideanoj, postrestintajn por estingi la elektran lumon kaj por... Ni ne estu maldiskretaj !)

*La Junulo* (por savi la saveblan kaj por subpremi misteran ŝmacan sonon) : Vivu Esperanto !

*Komitatoj* (entuziasme kaj plempulme) : Vivu Zamenhof !

(La gvidantoj de la loka movado grupe kaj digne paŝadas malsupren en la ŝtuparejo).

1a *Komitatano* : Vi, tre estimata sinjoro doktoro samideano, bonvolis bone klarigi la situacion en la organiza afero. Prave kaj brave vi diris, ke ni devas organiziĝi, sed tiel, ke ni restu absolute neŭtralaj en ĉiu problemo de la movado. Mi gratulas.

2a *Komitatano* : Sed ankaŭ vi, samideano, eminente montris nian novan malamikon. Vi havas per tio gravan meriton. Mi gratulas.

1a *Komitatano* : Ĉu ne ? Ankaŭ vi tiel opinias. Ĉu ne ? Bedaŭrinde mi forgesis la plej ĉefan punkton de mia parolado.

2a *Komitatano* : Ĉu ? Vere mi bedaŭras.

1a *Komitatano* : Jes, jes ! Mi forgesis menciĝi, ke ĵus mi laboras pri projekto, savanta nian lingvon. Restu inter ni ! Jam estas preskaŭ preta mia "Basic Esperanto".

2a *Komitatano* : Permesu ke mi gratulu ! Vere, nia sankta afero ni-rinde progresas.

1a *Komitatano* : Komprenoble, se ni laboras. La hodiaŭ kunsido vere firmigas en mi la fidon pri la estonteco.  
(Generala adiaŭ sur la strato. Disiĝo.)

*La Junulo* (ridetante al la Carmulino) : Estis vere genia ideo, Ĉu ne ?

*Carmulino* (petole) : Tiamaniere ni povas superruzi paĉjon. Ĉu ne ?

*La Junulo* : Estas bonŝance, ke mi trovis tiun ĉi societon, Almenaŭ dufoje semajne ni povas esti kune kaj sensuspekta.

*Carmulino* : Kiel vi opinias pri tiu ĉi Ispiranto aŭ Espiranto ? Ĉu ne estas bone lerni ĝin ?

*La Junulo* : Por ni estas superflue. Eĉ sen nacia lingvo ni komprenas unu la alian. (Subite li ŝtelas kiseton de ŝi).

*Carmulino* : Vi estas tute prava.  
(La nokte mallumo kapbalance-falas).

Julio BAGHY.

(El "Verdaj Donkijotoj", la rondo familia, Karikaturoj kun la speciala permeso de la aŭtoro.)

## Konstanta subteno

### 5a LISTO

Ni tutkore dankas niajn samideanojn kiuj, per mona aŭ morala subteno, helpas nin en nia malfacila laboro. Ni estas kortuŝitaj kiam simplaj laboristoj kiel S-roj "Mono" kaj "Dunkerque-ano", (kiuj eĉ ne permesas ke oni publikigu iliajn nomojn) helpas al ni per sumoj relative grandaj. Al ili kaj al ĉiuj ni diras koran dankon.

S-ro "Mono" en Dunkerque .....	100,00
Dunkerque-ano .....	20,00
S-ro Houzé en Dunkerque .....	100,00
S-ro Duchochois (2 <sup>mo</sup> versement) .....	10,00
Lille-ano, 10 <sup>mo</sup> de la Nacia Loterio.	230,00

## Vivo de la Grupoj

### GAMACHES (Somme)

Jeudi 4 août, réunion des Espérantistes au siège social, Hôtel Saint-Pierre, à 20 heures très précises.

#### Ordre du jour :

- Formation statutairement du groupe ;
- Nomination des membres du bureau ;
- Organisation des cours ;
- Affiliation à la Fédération Espérantiste du Nord (Somme, Nord, P.-de-C.) et à divers groupements internationaux ;
- Divers, s'il y a lieu.
- Présence indispensable.

*Le Fondateur* : M. DUCHOCHOIS,  
2, Grande-Rue, Gamaches.

S'y adresser pour tous renseignements. — Téléphone 34, Gamaches.

*Examen espérantiste.* — M. Roger Evrard, professeur instituteur à l'Ecole Moderne (Oisemont), après deux mois d'études Espérantistes, a obtenu le diplôme élémentaire d'Espéranto de la Société Française pour la propagande de l'Espéranto (30 juin 1938). Ce diplôme lui a été délivré par le délégué de la S.F.P.E. à Gamaches, M. Duchochois.

Le jeudi 18 août a eu lieu à Gamaches dans la salle de réunions, l'assemblée générale du groupe Verda Stelo. La séance était présidée par M. Delabie, député, membre du groupe espérantiste parlementaire. M. Baillet, maire de Gamaches était présent. Le comité a été ainsi constitué :  
Président d'honneur : M. Delabie ; président actif : M. Duchochois ; vice-président : M. Sellier ; secrétariat : M. Evrard ; trésorerie : M<sup>lle</sup> Suzanne Riehl. MM. Charpentier et Loiseau ont été désignés et élus pour compléter le comité.

Grâce à l'activité incessante du pionnier qu'est M. Maurice Duchochois, le groupe de Gamaches est définitivement formé et il est certain que bientôt des succès nombreux récompenseront le président-fondateur de son dévouement à la cause espérantiste.

A noter une très intéressante chronique espérantiste paraissant dans le journal régional "Bresle et Vimeuse".

### SOMAIN

Mardi 9 août, à 12 h. 45, place Victor-Hugo, aura lieu le départ de la caravane pour le Camp de vacances international espérantiste de Groët (Hollande). Vingt-sept jeunes filles du groupe espérantiste de Somain, ainsi que quelques jeunes gens, prendront, sous la direction de M<sup>lle</sup> Lepachelet, professeur d'Espéranto ; M<sup>lle</sup> Dubois, institutrice, et M<sup>lle</sup> Lecerf, directrice de l'école des filles de la rue Paul-Bert, l'autobus qui les conduira jusque Tournai. De là, un autre autobus les conduira à Bruxelles, qui sera visité, puis à Anvers où coucheront nos espérantistes. Le lendemain 10 août, aura lieu le départ pour Groët, située sur le bord de la mer, au nord de la Hollande, où ils logeront pendant huit jours avec des jeunes espérantistes de cinq pays différents.

Les organisateurs de cette rencontre internationale ont préparé méticuleusement un programme de distractions très chargé qui comportera des chants, des jeux, des théâtres, des excursions, etc... La visite d'une fabrique de fromages est également prévue. Plus de 250 jeunes gens et



jeunes filles y participeront et les principaux épisodes de cette rencontre seront filmés.

De leur côté, sous la direction de M<sup>lle</sup> Lepachelet, dont le dévouement et l'activité pour la cause espérantiste sont inlassables, nos jeunes filles espérantistes se feront les représentants de notre ville en se produisant devant leurs jeunes camarades des autres pays dans une pièce de théâtre et des chants espérantistes, et surtout dans des danses et chansons de nos provinces, notamment le "P'tit Quinquin".

Nos espérantistes ne s'ennuyèrent certainement pas, nous leur souhaitons un bon et beau voyage.

## JEUMONT

### *L'Assemblée Générale du Groupe Espérantiste "Paca Ligilo" de Jeumont-Marpent*

L'Assemblée générale annuelle du groupe s'est tenue le jeudi 20 juillet, à 20 h. à l'Hôtel de Ville.

M. Paul Lecat, président, était entouré de MM. Rampanaux, Mauron, vice-présidents ; Burton, secrétaire-trésorier, et des membres de la commission, M<sup>lles</sup> Brenelle et Coquelet assistaient également à cette assemblée.

M. Paul Lecat déclare la séance ouverte et donne la parole à M. Burton, pour le compte-rendu moral et financier de la société. Avant de commencer l'exposé traditionnel, faisant le point de la société, M. Burton se plaît à dire le plaisir qu'il a de se trouver au milieu d'une assemblée où ne se trouvent que des figures amies ; puis il félicite et remercie le Président de son appui au cours des différentes manifestations du groupe : bals, sortie champêtre, etc.

Le secrétaire du groupe, en des termes choisis, remercie M. Rampanaux, dont le dévouement à la cause espérantiste et à la société est sans borne ; ses remerciements vont aussi à M<sup>lle</sup> Coquelet et à M. Mauron pour le recrutement des membres honoraires. M. Burton donne ensuite lecture de la situation financière du groupe, situation très satisfaisante et qui, pour reprendre les paroles du secrétaire-trésorier, a mis « les affaires de la Société à l'aise ». M. Burton termine en demandant à chaque membre de continuer à progresser dans la voie où le groupe l'a engagé en restant bien persuadé que l'espéranto sous le signe de l'étoile verte c'est l'avenir.

Un ban est alors proposé en l'honneur du dévoué secrétaire ban qui est battu avec beaucoup de vigueur.

La parole est ensuite à M. Paul Lecat.

